

SUDFRANCIA ★ STELO

N° 172 – 1a kvaronjaro 2005 – 1° trimestre 2005 – 2 €

☆☆

Dulingva bulteno eldonita de la Esperanto-federacio de Langvedoko-Rusiljono

Bulletin bilingue édité par la fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon

Jarabono/Abonnement : 7 € al pĉk/au CCP 956-28 P Montpellier (fédé d'E°)

☆☆

1905-2005



Esperanto : perspektivoj post 100 jaroj de renkontiĝoj

Dum la paska semajnfino kolektiĝis en Bulonjo ĉe Maro pli ol 500 esperantistoj de diversaj asocioj de franclingvio, Belgio kaj Britio, el dudeko da landoj, por digne celebri la centjariĝon de la unua Universala Kongreso en Bulonjo . Solena kaj emociiga inaŭguro en la teatro, kie okazis la unua kongreso kaj kie Dro Zamenhof diris :“ Hodiaŭ en la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marō kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed **homoj kun homoj**“ ; solenaĵoj kun oficialuloj, simpozio, prelegoj, kunvenoj, riĉa programo arta kaj turisma... Detalaj raportoĵ aperis/os en la asociaj revuoj, ekzemple en « Esperanto » de majo sur 5 paĝoj . La dua parto de la festado de la centjariĝo disvolviĝos en julio en Vilno (Litovio) .

AMIKOJ DE E°

Forpasis en Romo Papo Johano Paulo la Dua .

Li restos en la memoro de multaj esperantistoj, ĉar interalie li aprobis la uzon de esperanto por la tuta katolika meso kaj ekde 1994, en liaj benoj « urbi et orbi », paske kaj kristnaske, li ankaŭ uzis esperanton . La bildo dekstre aperis sur la frontpaĝo de « L'Indépendant » la 28an de marto (ĝusta dimensio 19x14cm). Ĝi montras grupeton de romaj esperantistoj, kiuj tradicie ĉeestis kun siaj paneloj, kiuj konsistigis la vorton « esperanto » kaj estis rimarkitaj de la kameraoj .



Place St Pierre, sans un mot, le pape a ému les croyants
Plusieurs dizaines de milliers de catholiques et de touristes ont assisté hier à la messe posée sur la place Saint Pierre, les yeux tournés vers la fenêtrre où le pape est apparu sans pouvoir prononcer un seul mot. Page 17

Antaŭ cent jaroj malaperis **Jules Verne**, kiu favoris esperanton . Li estis honora prezidanto de la E°-grupo de Amiens . En lia lasta romano, studvojaĝo (« Voyages d'études »), li antaŭvidis plurajn paragrafojn en la internacia lingvo . Li ne havis la tempon finskribi la libron kaj lia filo kompletigis ĝin dek jarojn poste, kun alia titolo, por felietono, forviŝinte ĉiun mencion pri esperanto ! Jules Verne estis arda defendanto de esperanto, tiam en siaj komencaj jaroj . Antaŭ nelonge la televidkanalo «Voyages» intervjuis Zef Jégard (vidu p.8), kiu biciklis de Bresto ĝis Vladivostoko sur la spuroj de Michel Strogoff, heroo de Jules Verne .



Niaj venontaj rendevuoj :

- En majo : 18-25 V : staĝo en Batipaume (Agde)*
- En junio : 19 VI : pikniko en Campagnan (vidu sur p.3)*
- En julio : 20VII-3VIII : busvojaĝo al la UK de Vilno (Litovio)*
- En aŭgusto : 20-27 VIII : semajno de Sète (vidu sur p. 6 /7)*
- En septembro : forumoj de asocioj kaj federacia kunveno*

Poŝtmarkoj aperontaj fine de majo



FEDERACIA KUNVENO en Lunel la 9an de aprilo :

En kursivoj postkunvenaj rimarkoj, inter citiloj komentoj aŭ demandoj de partoprenantoj .

Partoprenis 24 geesperantistoj, senkulpiĝis pluraj (Ges. Bernard, Carbonnel, Mouré, Santos) . *Niajn kondolencojn al Gilbert Santos, kiu perdis sian fratinnon* . Por akcepti nin, atendis nin trinkaĵoj kaj biskvitoj (dankon pro la agrabla intenco) . La prezidanto, Jean Hénin, bonvenigis ĉiujn, pardonpetis pro sanproblemoj, dankis la ĉeestantojn pro ilia veno kaj speciale Georges Gonthier pro la organizado de la tago . Estis disdonita la tagordo kaj modifita nur la sinsekvo de la pritraktindaj punktoj . Lucette Négron prezentis la **financan raporton** , JH levis la problemon de asekuo por niaj agadoj ; oni informiĝos ĉe Maif . Li prezentis koncize la **agadraporton** (detaloj jam aperis en la jara raporto al UFE kaj regule en SFS) . La du raportoj estis unuanime akceptitaj . Aldone la prezidanto aldonis personan komenton ; li opinias, ke plurokaze kaj je diversaj niveloj (loka, regiona, nacia) manifestiĝas ia « angulismo », (la emo sin okupi en sia angulo, senkonsidere de tio, kio okazas en Esperantio), kiu estas la malo de kunlaboro kaj reciproka informado . Li donis plurajn ekzemplojn . « Unueco estas forto » ; « Ni ankaŭ respektu la diversecon ! » .

Komitato : Renovigeblas ĉijare : S. Authier, J. Boccadifuoco, C. Gérard-Voincon, L. Négron, C. Poncy.

C. Poncy ne rekandidatiĝas . Estas alektitaj du novaj membroj : Serge Eysseric (Montpellier) kaj Jean-Pierre Peray (Béziers) . Teorie informoj devas cirkuli de supre (UFE aŭ la estraro de la federacio) al malsupre (individuaj membroj) kaj inverse . Sugestoj de komitatanoj estas bonvenaj iam ajn, ne nur dum kunvenoj . Komitatanoj estas ankaŭ konsulteblaj pri urĝaj aferoj, kiel laste pri la vojaĝo al Vilno . Rezentos nin ĉe la komitato de UFE Georges Gonthier, anstataŭanto JH .

Bulonjo : deko da federacianoj partoprenis la kongreson de B. Pozitivaj impresoj ; la kongreso estis komuna por pluraj asocioj (Ufe, Sat-Amikaro, Jefe, Ffea (fervojistoj), Fet, Fkea (katolikoj), E°-asocioj de Britio kaj Belgio) . Riĉa programo, pli ol 500 esperantistoj, solenaĵo en la historia teatro kaj akcepto en la urbdomo, inter aliaj... Pozitiva rezulto estas, ke nun komune kongresos ĉiun trian jaron E°-France (Ufe) kaj Sat-Amikaro . Biteraninoj bedaŭras, ke ne estis banderoloj por klare indiki, kiuj ni estas, dum la « parado » tra la urbo kaj ke Ufe tiris profiton de la komuna aranĝo . JH ankaŭ bedaŭras, ke ne estis disdonitaj informiloj dum la rimarkita parado, ke oni limigis la aliĝojn al la kongreso por rezervi lokojn por oficialaj invititoj al la teatra solenaĵo, kiuj nur malmultnombro venis . La kongreso estis organizita de la norda federacio (en Bulonjo ne ekzistas E°-grupo), en kiu aktivas respondeculoj de Ufe, kiuj gvidis la aranĝojn . Gratulojn al la organizintoj, la tasko ne estis facila . Nova skipo de Ufe estis elektita ; Bruno Flochon estas la nova prezidanto, Vincent Charlot la sekretario .

Vojaĝo al Vilno : JH raportas pri la progreso kaj la problemoj de preparado . Aliĝis dekdu federacianoj (dekkvin kun familianoj), entute 38 personoj . Mankas nur 2 aŭ 3 partoprenantoj por la financa ekvilibro . La federacio eltenos la antaŭvideblan deficiton . Okaze de nia septembra kunveno aŭ de la Z-tago en decembro, ni prezentos bilde la vojaĝon tra Eŭropo . Ni kontaktos alian transportiston (Kompanio Bourrier en Montpellier, kun la helpo de Ges. Eysseric) . *Ni ricevis pli interesan oferton de la kompanio Bourrier, kiu jam deĵoris dum la UK de Montpellier* . La UK bone prepariĝas en Litovio, pli ol 200 gefrancoj aliĝis .

Grupoj : Jean-Pierre Peray atentigas pri la staĝo de Batipaume en Majo (18-25) . Alvenis nur dekdu aliĝoj (ne enkalkulante la eventualajn aliĝojn de ge-Biteranoj) . Ĉu pluorganizi la staĝon ? Ŝajnas, ke estas pli kaj pli da okazoj staĝumi . La okazigo de merkredo al merkredo estas diskutinda . Bedaŭrinde ni malofte renkontas la respondeculon de la staĝo . Ĉu ne endus konigi la novan lokon, raportonte ekzemple en « Le Monde de l'E° » ? Eblas partopreni unu aŭ du tagojn aŭ nur semajnfine . *Intertempe alvenis novaj aliĝoj kaj la staĝo povos disvolviĝi ĉi-jare* .

En Lunel ne plu daŭras la kurso pro ŝanĝoj en la horaro de iuj ; ili tamen daŭrigas per la retkurso . En Montpellier la vizito de Litovino, Gražina, ravis ĉiujn . Gratulojn pro la nova partopreno de la grupo en la prelegturneoj de Ufe . En kolegio de Lunel Hélène Cazejust instruas esperanton al dudeko da gelemantoj . Pri la semajno de Sète, la informiloj estas pretaj (konsulteblaj rete ankaŭ) .

SFS : la enhavo dependas de la ricevitaj informoj . Kiel kutime, la limdato ne estas ĉiam respektata... Prefere oni sendu tekstojn jam redaktitajn en E° (en ĉiu grupo estas iu por kontroli) . La redaktoro ne ĉiam scias, kion oni intencis esprimi . Ne sendi plurajn raportojn pri la sama afero ! Dankon al A. Capus pro la presado kaj ekspedo kaj al L. Négron pro la kontrolo de la abonoj (ne estas ĉiam evidente, de kiu venas la pago; pro tio sendi al ŝi la ĉekon (izolitaj esperantistoj) por enkasigo) .

Forumoj de asocioj : certe grava momento por sin konigi kaj varbi . Nicolas Karatzaferis riparas la elektronikan panelon . La federacio mendis la novajn panelojn de Ufe kaj ni havas la okazon malkovri ilin . La aspekto estas alloga ; iuj opinias, ke la tekstoj estas foje tro longaj . Ni uzos la malnovan materialon (plastaj vitroj) por protekti ilin . Komprenoble ne necesas uzi ĉiujn panelojn, kiam mankas spaco ; sufiĉas tiam tri aŭ kvar paneloj . Ankaŭ eblas proponi la panelaron al asocio, lernejo dum kelkaj tagoj . Pri la forumoj, JH memorigas pri iuj necesajoj (alloga prezento de la budo, argumentado kun vizitantoj, ktp) . Estas prezentataj kaj vendataj novaj informiloj : KD-rom de Jefe (speciala vendoprezento : 1^E), ĉiu grupo ricevos kvanteton por la forumoj de asocioj ; belaspekta kartona faldfolio pri la bazo de esperanto, realigo de « Réinsertion et E° », +3^E, trovebla ĉe Fnac aŭ vendejoj ĉe aŭtoŝoseoj, dua faldfolio estas en preparo kun frazoj por konversacio . Estas ankaŭ disdonitaj kalendaretoj kaj informiloj de Jefe .

Estas ankaŭ prezentataj novaj libroj : « Tinĉjo en Tibeto » (speciala vendoprezio 10 E) kaj « Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo » (franca kaj esperanta versioj) . Tiaj libroj estas montrindaj okaze de forumoj .

Eksteraj rilatoj : Mado Vidal parolas pri Attac kaj la socia forumo en Barcelono en junio . La rilatoj kun la skoltoj en Béziers ne daŭris . Pri la Domo de la Triaj Mondoĵ en Montpellier, Annick Tora indikas, ke nova tago de malfermitaj pordoj okazos aŭtune .

Biblioteko : Pluraj Montpellieranoj jam atakis la ordigon, senpulpvorigon, riparadon de libroj de la grupo . Listo laŭ alfabeto ordo de aŭtoroj estas ankaŭ preta . Ĉu ne pli oportune listigi la librojn laŭ kategorioj kun spaco inter la kategorioj por kompletigi la liston ? Monique Eysseric kaj Josée Boccadifuoco prizorgos la problemon . Libro estas stokitaj en Nimo ĉe S-ino Soulier . André Capus ankaŭ mencias, ke parto de la libroj de forpasinta Sro Diez estos por la grupo de M. Do, entute sufiĉe riĉa librokolekto en perspektivo, kun iom da laboro antaŭvidebla . Necesos konsideri la aĉeton de ŝranko ; la libroj estos en la urbdomo de Lunel Viel, je la dispono de la interesitaj federacianoj . Iu proponas donaci la tuton al iu urba biblioteko . En tiu kazo ni dependus de la horaroj de la biblioteko . « Ĉu ne multe da laboro, kiam homoj ne legemas ? » . « Tiuj libroj estas valoraj kaj estas nia hereda have » . Poste ni kompreneble pliriĉigos la kolekton per aĉeto de novaj libroj . Ĉu tro ambicie ?

Rendevuoj : ĉiumonate okazas io en nia regiono . La 7an kaj 8an de majo Katalunoj organizos semajnfinojn en Villafranca de Conflent . Malfeliĉe la informo alvenis post la lasta bulteno (ĉu nova ekzemplo de angulismo ?) . De la 18a ĝis la 25a de majo, CBE organizas staĝon en Batipauze (Agde), en loko pli trankvila ol en Vias (detaloj en la lasta SFS) .

En junio vi estas invitataj dimanĉon, la 19an, al pikniko en Campagnan, proksime de Montagnac (34) ĉe Gilbert Santos kaj Marie-Thérèse Lemaire (04 67 25 33 73) . Alportu vian manĝon kaj la manĝilaron !

Ne mankos por la aperitivo la loka muskatvino nek amika etoso .

Se estos varme, naĝejo estos je via dispono...aŭ eble vi preferos promeni tra la arbaro aŭ babilu kun gesamideanoj . Notu la daton kaj nepre venu multnombraj . Ju pli da « frenezuloj »...

..kaj kompreneble en julio estos nia ekspedicio al la UK kaj en aŭgusto la semajno de Sète .

La kunveno en Lunel finiĝis per la promeso sin revidi baldaŭ . Ĝis !

Forgeso : tagmeze estis longa agraba paŭzo en la restoracio « La Tosca » kun bongusta manĝo . Dankon denove !



Venditaj en Lunel kaj proponotaj en Campagnan (19/6) : faldfolio pri la bazoj de E°, KD-rom por prezenti kaj instrui esperanton kaj nova albumo de Tinĉjo (respektive 3^E, 1^E, 10^E), ankaŭ mendeblaj al SFS (kun aldono de sendkostoj) .

VIVO DE LA GRUPOJ :

MONTPELLIER

Ĝenerala kunveno de la 12a de februaro en MPT Escoutaire .

Ĉeestis 16 homoj, 7 sendis prokuron . Je la 10a horo Annick Tora malfermis la kunvenon, Serge Eysseric prezidis la kunsidon . Antaŭ ĉio AT informis pri la nombraj bondeziroj el la diversaj administracioj de la urbo, urbaro kaj ĝenerala konsilantaro .

La **agadraporto** estis riĉa pro multaj aktivecoj : staĝoj, monataj kunvenoj (en Béziers, Lunel, La Roque d'Anthéron kaj Montpellier) . Novaj kursoj malfermiĝis dank'al la forumo de asocioj kaj ankaŭ novaj gelernantoj frekventas ilin . La grupo ne forgesis celebri la Zamenhofan tagon, nek partopreni en la tago de malfermitaj pordoj en la MJC de Lunel .

La **financa raporto** estas favora, la subvencio de la urbdomo plialtiĝis . Reine Celiqua bonege reorganizi--zis la bilancon . Oni decidis plialtigi la aliĝkotizon en 2006 : 22 eŭroj anstataŭ 20 . La raportoj estis unuanime voĉdonitaj . Renovigo de la **estraro** : prezidantino : Annick Tora ; kasistino : Reine Celiqua ; sekretariino : Monique Eysseric .

Projektoj : Oni petos salonon de la urbestro de Castelnaud por gastigi la lernantojn de Ges. Dumas . Rosa Aumeunier disdonas la liston de la libroj necesaj por la ekzamenoj de « Kapableco » . Akcepto en Montpellier de Graĵina Opulskiene (Litovio) ekde 2005.02.28 ĝis 03.03. La Kultura centro pagos la restadon kaj la vojaĝon el La Ciotat . Bonvolemluloj estas petataj por gvidi nian litovan amikino kaj traduki en la francan . La kunsido finiĝis je la 12a kaj duono .

Vizito de Litovino (kunfando de du raportoj)

Lundon, la 28an de februaro, ses geesperantistoj atendis Graĵina en la stacidomo por bonvenigi ŝin, agrabla surprizo por ŝi . Ni estis ravitaj konatiĝi kun ŝi kaj ŝia afableco . Dum ŝia restado, ŝi estis gastigita de Monique kaj Serge Eysseric en Montferrier . Ni manĝis kune en restoracio Flunch . Posttagmeze ni vizitis la malnovan parton de la urbo kaj la ĝardenon Le Peyrou kaj la Lernejon de

Medicino . Helpis Jeannine Bony por la tradukoj . Mardon la tago komenciĝis frue kun la vizito de Pont du Gard, kie kvindek pacemaj japanoj « mitralfotis » nin... kaj la ponton . Post la malvarmega vento, la akcepto en la kolegio Ste Thérèse de Lunel varmigis niajn korojn . Hélène Cazejust kaj Christian Mouré instruas tie esperanton al trideko da gelernantoj . La direktorino de la kolegio, tre afable, invitis nin por la tagmanĝo . Jeannine Bony havis la tre bonan ideon kunporti E^o-flaĝeton, kiu flirtis dum la tuta tagmanĝo, allogante la gelernantojn kaj geinstruistojn . Poste ni rendezuis en la E^o-salono, kie Graĵina klarigis per mapo, kie troviĝas Litovio . La dekduo da gelernantoj tre interesiĝis pri la rakonto de Graĵina, kaj tuj post skeĉeto, kiun interpretis tri aŭ kvar el ni, la gelernantoj ankaŭ ludis skeĉon, kreitan de ili . Post tiu juneca etoso, ni renkontis en « Jardins d'Olympie » nian E^o-veteranon Léo Lentaigne, kiu ĝojis paroli kun Graĵina kaj li donacis al ŝi « 40 paŝetoj » kaj « Kiel diri » . Li konfesis, ke la okazoj paroli kun alilandanino estas maloftaj kaj despli revigligaj por li . Je la 18a kaj duono en MPT Escoutaire pli ol 30 gesamideanoj, inter kiuj 3 neesperantistoj, aŭskultis la prelegon de Graĵina ; demandoj abundis pri Vilno, urbo de la venonta U.K.Nova etapo : komuna vespermanĝo en la restoracio « La Arlekeno » . Merkredon, ni vizitis la Domon de Eŭropo, junuloj klarigis la funkciadon de tiu institucio . Poste Claudine Poncy veturigis Graĵina al la bunta haveneto Port Ariane, al la marbordo en Palavas, kie panoramo estas ĝuebla de la akvoturo, la katedralo de Maguelone ;



(de dekstre HC kaj Graĵina)



(de maldekstre : Georges Gonthier, Graĵina, Annick Tora)

Graŝina fotis fenikopterojn . Post la reveno en Montferrier ĉe la gastigantoj Ge-Eysseric, ni ĉiuj tostis, trinkante ĉampanon kaj ni bankedis en gajega etoso .

Ĵaŭdon estis la foriro de Graŝina ; ŝi estis tiel afabla, ke la francaj fervojistoj deziris gardi ŝin iomete pli kaj tiam ili ekstrikis...

Tiu renkontiĝo estis fruktodona, ĉar ĉiuj devis paroli nur en E^o, kaj Graŝina estis por ni sunradio !

P.S : post ricevo de fotoj, senditaj rete de Christian Mouré, Graŝina skribis : « Finfine mi estas hejme kaj povis rigardi fotojn faritajn de vi kaj montri ilin al miaj proksimuloj . Memorajoj pri renkontiĝoj en Francio nun ornamas la ĉiutagecon ; estis bele vidi tiom da interesaj lokoj kaj renkonti tiel multajn interesajn personojn . Koregan dankon kaj saluton al Helene kaj viaj ĉarmaj lernantoj .Elkore,Graŝina”

Bela anekdoto :

Komence de la lernjaro, nia amiko Jorgo akceptis en sia kurso de Lunel Sinjorinon « Mireille », kiu deziris lerni esperanton .

Ŝi diris, ke de nelonge ŝi aŭdis pri E^o, kiun ŝi ne konis . Ŝi demandis sian patrinon, ĉu ŝi sciis ion pri tio . Por la unua fojo, ŝia patrino rakontis, ke ŝia avo (do, la praavo de Mireille) estis esperantisto, ke li helpis en la jaro 1905 la organizadon de kongreso en Bulonjo ĉe maro . Kiam li mortis, la familio forjetis la librojn, poste oni ne plu parolis pri li .

Tiu rakonto mirigis Mireille, kiu tuj decidis pli scii pri E^o.

Do, ŝi vizitis la komencantan kurson en Lunel . Jorgo klarigis al ŝi, ke fakte ŝia praavo, Alfred Michaux, estis la organizanto de la unua universala kongreso . Plie, li precizigis, ke Michaux akceptis Doktoron Zamenhof, la kreinton de E .

Ŝi tiel miris pri sia praavo, ke ŝi rakontis tion al sia edzo, kiu de la komenco iom mokis ŝin pri tiu nova pasio . Konklude : la sekvantan semajnon, ŝi ĉeestis la kurson kun sia edzo .

NDLR : ŝi ankaŭ vizitis la kongreson de Bulonjo kun sia edzo !



ADVOKATO MICHAUX
Organizinto de la 1^a Universala Kongreso.

DOKTORO ZAMENHOF
Aŭtoro de Esperanto.


Vizito de itala amiko

De pluraj jaroj mi konatiĝis kun Aŭgusto, itala esperantisto, dum pluraj staĝoj en Bouresse . En aŭgusto 2004, li ĉeestis la staĝon en Sète . Mi proponis al li viziti Montpellier post la staĝo . Sed, ĉar li estas psikiatro kaj ankoraŭ laboras , li devis reiri Romon tuj post la staĝo . Li tamen akceptis mian inviton, nur por la vintro . Do, la 14an de januaro li alvenis en Montpellier . La morgaŭon okazis la monata kunveno kaj tie li konatiĝis kun kelkaj geamikoj . Mi timis, ke li enuos, ĉar mi ne havas veturilon, plie la marŝo dolorigas mian dorson kaj mian genuon . Sed li trankviligis min : « mi ŝatas vidi malnovajn ŝtonojn, domojn, kaj promeni, viziti sola ; tio tute ne ĝenas min » . Do mi pruntedonis al li mian dormoĉambron . Dorminte sur kanapo, mi povis matene prepari la matenmanĝon kaj proksimume je la deka horo li foriris buse kaj trame (mi antaŭaĉetis por li semajnan bileton) kaj li revenis proksimume je la 19a horo . Ĉiun vesperon mi klarigis al li, kio estas vizitinda . Yvette Vierre kaj Leo Lentaingne rakontis al mi kelkajn historiajn anekdotojn, tiel li sciis ĉiun tagon, kie li povis viziti .

Li devis foriri la 21an, sed pro fervojaj strikoj li preferis entrajniĝi merkrede . Tiel li estis certa atingi sian hejmon sabate . Li diris, ke mia gastigado estis tre afabla . Li petis min saluti ĉiujn esperantistojn je lia nomo .

J. B.

ANONCETO :





Ekde septembro de la 2003-a jaro mi starigis ĉe mi mozaiko-atelieron. Mi kreas diversajn objektojn kiel subpladojn, florujojn , spegulojn aŭ portretojn (ankaŭ kun verdstelaj ornamajoj) . Mi renovigas ankaŭ etan meblaron . Vizito kaj klarigoj (nur esperantlingve) laŭ antaŭpeto : S-ino Hanna Cayzac, Montpellier, tel. 04 67 61 08 66 cayzachanna@netcourrier.com .



31a Internacia E^o-semajno de Sète

inter maro kaj lagoj
niaj pasiaĵoj interdoniĝu



LE LAZARET
centre familial
familieca feriejo



31a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
31^{ème} SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPÉRANTO
2005-08-20 2005-08-27
"LE LAZARET" SÈTE (FRANCIO)



Aliĝoj kaj informoj :

ESPERANTO CULTURE ET PROGRÈS
5, rue Docteur Roux
FR 34090 MONTPELLIER Francio
tel : 04 67 54 15 43

<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>

INTERNACIA SEMAJNO ESPERANTISTA

La asocio "Esperanto Kulture kaj Progreso" proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj che Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bela vetero sed ekstere de la somera troa homamaso.

Che ni vi ghuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ... banadon, fishkaptadon, ekskursojn kaj... bonan manghajhon.

SÉJOUR LINGUISTIQUE AU BORD DE LA MER

L'association "Espéranto culture et progrès" vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Espéranto.

Profitez-en pour passer en même temps d'agréables vacances à SÈTE, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival.

Chez nous vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, pêche, excursions et ... bonne table.

Adreso dum la semajno :

Maison Familiale "Le Lazaret"
La Corniche, rue du Pasteur Benoit
34 200 Sète (Francio)
tel : 04 67 53 22 47 fakso : 33(0)4 67 53 36 13

Programo :

Matene : Diversnivelelaj kursoj.
Posttagmeze : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo.
Vespere : amuzaj, distraj kaj kulturaj programoj.

Alighkotizoj :

55 eŭroj antaŭ la 1-a de majo.
70 eŭroj post tiu dato.
Senpaga por gejunuloj malpli ol 26 jaraj.

Loghado : pluraj eblecoj

La feriejo taŭgas por rulseĝuloj

a) En la feriejo, jen la prezo por unu semajno :

I persono en unupersona chambro : 378 eŭroj

I persono en dupersona chambro : 291 eŭroj

I persono en familia chambro : 270 eŭroj

Prezoj por infanoj laŭ peto.

La prezo entenas loghadon kaj tri manghojn tage.

Mendo de loghado : post antaŭpago de 100 eŭroj antaŭ la 15 / 07 / 2005.

b) Eblas tendumi.

c) Ankaŭ hoteloj estas je via dispono.

Limdato por aligo : 2005-08-14

31a INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO
31ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

SÈTE (FRANCIO) : 2005 / 08 / 20 - 2005 / 08 / 27

ALIGHILO
BULLETIN D'INSCRIPTION

Familia NOMO :
(Nom)

Persona NOMO :
(Prénom)

Adreso :
(Adresse) :

.....

.....

Tel. Num.
(n° de tel.)

(* Mi loghos en la feriejo "Le Lazaret"
(Je logerai à la Maison "Le Lazaret")

(* Mi antaŭendas unu liton :
(Je réserve un lit)

(* en unupersona chambro
(dans une chambre pour une personne)

(* en dupersona chambro
(dans une chambre pour deux personnes)

(* en familia chambro
en chambre familiale

(* Mi ne loghos en la feriejo "Le Lazaret", sed mi manghos regule.
(Je ne logerai pas à la Maison "Le Lazaret", mais j'y mangerai régulièrement.)

* Forstreku la neutilan linion
(rayer la mention inutile)

Sendu la alighilon :
(Envoyer le bulletin d'inscription) :

ESPERANTO CULTURE ET PROGRÈS
5, rue du Docteur Roux
FR 34090 MONTPELLIER

Pagu al :
(Payez à)
ESPERANTO CULTURE ET PROGRÈS

poshtkonto numero : CCP n° 73 73 65 E Montpellier

ATENTU !!! Bonvolu aldoni afrankitan koverton kun via adreso
(ATTENTION !!! Veuillez joindre une enveloppe timbrée avec votre adresse)

1. Se vi manghos en feriejo "Le Lazaret" :
chu vi estas vegetarano? Jes Ne
1. Si vous mangez au "Lazaret" :
êtes-vous végétarien ? Oui Non
2. Mi sekvos la kurson
2. Je m'inscris au cours suivant

- por komencantoj aŭh unuan paroligan kurson : Sinjorino Josée

BOCCADIFUOCO
(pour débutants)

- duan paroligan kurson : Sinjoro Jean-Pierre PERAY
(cours 2ème degré)

- perfektigan kurson : Sinjoro Daniel MOIRAND
(cours de perfectionnement)

Diversnivelaĵ ekzamenoj eblas.

Possibilité de présenter des examens.

Nouvelles brèves :

Chez nos voisins :

Toulouse : Le forum des langues du monde se tiendra sur la place du Capitole les 28 et 29 mai . 120 langues présentées sous abri par plus de 70 associations (dont évidemment l'E°) .
 Détail du programme sur demande . En préalable, les 26 et 27 mai, colloque de l'AULF (association universitaire des langues de Fr) .

Week-end d'étude de l'E° à Arrout les 4 et 5 juin : <http://esperanto.toulouse.free.fr>

Du 19 au 24 Juin deux groupes de jeunes de Zagreb participeront au festival de théâtre des enfants, le groupe des 10-13 ans jouera une pièce en E°, le groupe plus âgé jouera en F .
 Radio FMR peut être écoutée sur la toile à www.radioarkivo.org

Stage choral en Ariège : le prochain aura lieu pendant les vacances de Toussaint et non pas en février, du 29 octobre au 5 novembre .

Barcelone : Forum social méditerranéen . Il aura lieu à la mi-juin ; possibilité de participer en E° à un atelier sur la culture, le libre échange ou la condition féminine (s'inscrire sur <http://www.asmed.info>) . Infos sur le forum auprès de Alain Fauré, président de Attac Béziers : enkidou@club-internet.fr

Calella (80 km au nord de Barcelone) : 13^{ème} semaine internationale de culture et tourisme du 1^{er} au 8 octobre . Bulletin d'adhésion disponible à SFS ou consulter <http://www.terra.es/personal5/lserano2003>
 Plus de détails dans le prochain bulletin .

Ici et là :

Baugé (Grésillon) organise des stages tout l'été (programme et tarifs sur demande), du 2 au 20 août, du samedi au samedi, ainsi qu'une semaine de repos du 20 au 27 août .
 La rencontre d'enfants, prévue à Pâques, n'a pu avoir lieu mais on travaille déjà d'arrache pied pour l'édition 2006 .

Plouézec (Bretagne) organise ses 9^o rencontres internationales du 13 au 20 août . Le matin, cours (9 groupes), l'après-midi activités diverses, le soir animations .
<http://www.plouezec.fr/esperanto.html>

Groupes d'E° dans différents pays : plus de 360 groupes figurent sur la carte d'Esperanto-Land, dont 66 pour la France .
<http://www.esperantoland.org/grupoj.mapo.php?mapo=12> Si vous désirez que votre groupe figure : <http://www.esperantoland.org/grupoj>

Service passeport : « Pasporta Servo »

Plus n'est besoin de présenter ce réseau d'accueil gratuit dans les familles . En 2004, 1227 adresses dans 79 pays ; en 2005, 1364 dans 89 pays . Dans notre région, une adresse supplémentaire à Argelès mais une en moins à Montpellier . Notre région est très demandée et des adresses supplémentaires sont souhaitées .
 Rappel : c'est vous qui posez vos conditions .



A bicyclette : Zeg Jégard (Yffiniac près de St Briec), 67 ans, a réalisé l'an dernier le trajet Brest-Vladivostok à bicyclette et relaté son aventure dans « Papy fait le tour du monde » . Comme Zef a deux passions, la bicyclette et l'espéranto, la version en langue internationale est parue : « Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo » .
 Zef peut être contacté à zefj@wanadoo.fr mais se trouve peut-être déjà sur les routes, pour 6 semaines cette fois . Pour connaître sa situation ou sa destination, consulter www.zefj.com .
 Bon vent à Zef !

Afrique :

Au Congo, à l'université de Kinshasa, des cours d'E° ont commencé mais l'enthousiasme est grand et on manque de livres pour débutants, de dictionnaires, etc . Qui peut aider Emile Malanda Nianga (prezidanto_dkea@yahoo.fr)
 DKEA/EKM B.P.761 Kinshasa XI RDC ?
 Le CIE (Centre international d'E°) B.P.3171 Antanety-Nord Lot : IVI 159L Ambohimananari MG-101 Antananarivo -Madagascar a aussi besoin d'aide pour continuer d'organiser des cours . Pour l'envoi de dons, contacter : rmian@mail.blueline.mg

Nouvelles brèves : langues

Bruxelles : discrimination

Encore et toujours, des entreprises, subventionnées par la Commission Européenne, font paraître des annonces de recrutement avec la mention « English mother tongue » ou « English native speakers », ce qui est contraire aux règlements et écarte de fait des candidats d'autres pays européens, avec de bonnes connaissances de la langue. EEU et UEA ont déjà protesté auprès du médiateur mais la pratique se perpétue. Une circulaire aux parlementaires européens est prête en E°, elle est actuellement traduite dans les autres langues de la communauté. Sur le site <http://lingvo.org/diskriminacio> sont recensées un millier de ces petites annonces.

Suisse

D'après un recensement récent, l'allemand progresse (parlé par 74% de la population), l'italien et le romanche régressent. Le cabinet fédéral a décidé que d'ici un an tous les services administratifs devraient abandonner le recours à des noms ressemblant à de l'anglais et se limiter aux 4 langues officielles de la fédération.

Bretagne

Bien que le français soit la langue de la république et que le breton et le gallo soient à peine tolérés, le préfet des Côtes d'Armor a mis en place un réseau de fonctionnaires anglophones, afin « d'établir des relations privilégiées avec les associations de résidents britanniques vivant dans le département ».

Le Conseil Régional de Bretagne a adopté une résolution reconnaissant le breton et le gallo comme langues de Bretagne.

Hongrie

En Hongrie, à l'inverse de la Grande-Bretagne, les étudiants sont tenus d'apprendre les langues étrangères. L'espéranto figure parmi les options possibles; 7000 l'auraient pris cette année, 22000 au cours des cinq dernières années. Des détails et statistiques sur cette expérience peuvent être trouvés sur la page www.esperanto.hu/hu-lernejo.htm

Corée du sud

L'accent a été mis dans le système éducatif sur l'apprentissage de l'anglais; maintenant on se plaint d'une fuite des cerveaux...

Interdiction de l'enseignement de l'E°.

Il y a 60 ans, Hitler se suicidait à Berlin.

Il y a 70 ans, il interdisait l'enseignement de l'E°. Il y a plus de 80 ans, en 1922, M. Léon Bérard, ministre de l'instruction publique en France, lançait une retentissante circulaire contre la propagande en faveur de l'E°. Voici quelques extraits d'un long document sur cette circulaire, envoyé par notre infatigable ami Gustave Blary.

« Je suis absolument convaincu que l'E° n'a aucun titre à figurer dans l'enseignement. Les raisons, qui ont fait introduire de plus en plus les diverses langues dans les programmes, n'existent pas pour l'Esperanto. Pour admettre l'enseignement d'une langue dans nos classes, il faut qu'elle ait à la fois un usage très répandu et une littérature digne de ce nom. L'E° n'a ni l'un ni l'autre. Je n'insiste pas ici sur le caractère artificiel de l'E° (...). Il est absolument chimérique de penser qu'un jour prochain la plupart des hommes arriveront (...) à prononcer les mêmes sons de la même façon et à donner les mêmes sens aux mêmes mots. (...) Le français sera toujours la langue de la civilisation. (...) Le développement de l'E° nuit à l'enseignement des langues vivantes encore trop peu répandues et trop peu efficaces ».

Tout rapprochement avec des situations ou des propos récents serait l'effet du hasard...

Documents

Nous recevons régulièrement à SFS des documents que nous ne pouvons reproduire, à cause du nombre de pages de ce modeste bulletin et aussi parce que certains textes ne peuvent être cités partiellement. Ils peuvent vous être envoyés sur demande :

-versions en espagnol, portugais, polonais du texte en français de notre ami Henri Vigne, paru dans le dernier bulletin, à l'intention de personnes étrangères visitant ou s'installant dans notre région. Très utile pour les forums des associations en septembre. Qui pourrait traduire dans d'autres langues ?

—« La langue anglaise pour transformer chez les étudiants leur vision du monde » (M. Bérard doit se retourner dans sa tombe !), également l'original en anglais (2 pages), d'après une conférence du Pr. Phillipson, auteur de « Impérialisme linguistique ».



ARGUMENTS

Dans le dernier SFS, nous avons mentionné les remarques d'Axel de Tardé, journaliste à Europe 1. À la même date, un article de lui est paru dans « Paris Match », où, au moins, il soulève la complexité du problème des langues en Europe. Ci-dessous, réponse dans « Citoyens du Monde » aux propos tenus par J-L Calvet sur Europe 1 également (mentionné aussi dans le dernier bulletin). Le côté « artificiel » de l'E° est régulièrement mis en avant par ses détracteurs, qui parlent rarement d'autres langues de façon « naturelle ».

é c o n o c i a s t e

10

par Axel de Tardé

Europe : au secours, les langues !

Vingt-cinq pays et vingt langues... Bienvenue dans la nouvelle Europe. Depuis l'élargissement, les frais de traduction ont explosé d'un tiers. Ils atteignent, cette année, le montant record de 1,2 milliard d'euros, soit une moyenne de 2,70 euros par Européen... Car il n'y a pas de langue « pivot » en Europe. Quand un député français prend la parole au parlement de Strasbourg, il est directement traduit en allemand, en polonais, en maltais, en suédois... De même, chaque député slovaque, grec ou portugais est suivi par une armée de traducteurs dé-

diés. En tout, on compte ainsi 380 types de combinaisons possibles. Et attention : avec l'arrivée de la Roumanie, de la Bulgarie et de la Croatie en 2007, on franchira le cap des 500 combinaisons ! La tâche devient d'autant plus compliquée qu'un Croate capable de parler le lituanien, ça ne court pas les rues ! L'Europe, d'ailleurs, recherche activement ce genre de spécialités « exotiques ». Mais le pire reste à venir, car on voit maintenant se profiler la menace des langues régionales. Les Catalans et les Basques ont demandé à ce que

leurs langues respectives soient reconnues au niveau européen. Du coup, les Irlandais exigent que le gaélique, qu'ils essaient de faire revivre, soit également admis. Un député de l'Eire a ainsi annoncé qu'il allait prononcer un discours en gaélique à Strasbourg ! Pour éviter de sombrer dans le ridicule, il y a bien une solution : l'anglais. Mais les Français, notamment, ne veulent pas en entendre parler. Alors, certains annoncent l'idée de l'espéranto ; d'autres proposent d'aller réveiller le latin. « Cogito ergo sum », comme on dit à Bruxelles !

Artificiel, l'espéranto ?

Amené à parler de l'espéranto par de nombreuses questions d'auditeurs le 1er octobre 2004 sur Europe 1, le linguiste Louis-Jean Calvet a trouvé le moyen de dire, qu'il est artificiel, inventé de toutes pièces.

À travers toute l'histoire de la langue internationale (véritable nom d'origine de l'espéranto), des linguistes de grand renom tels que Max Müller, Michel Bréal, Antoine Meillet, Edward Sapir, ont fait remarquer qu'elle n'est pas inventée de « toute pièce ». Ses « pièces » sont toutes issues de langues existantes. Zamenhof a été amené, en fait, à choisir, adapter et aménager des éléments existants et non à en créer. Son travail s'apparente à celui de linguistes, de grammairiens et de philologues qui ont modernisé des langues telles que l'hébreu ou réalisé une synthèse de dialectes : l'italien formé par Dante, le landsmal (= langue du pays, néo-norvégien dit nynorsk), fruit des travaux d'Ivar Aasen, ou l'indonésien. Le français, l'anglais, le russe, et bien d'autres langues ont subi des interventions que nul ne peut qualifier de

« naturelles ». Il est donc abusif, sinon malhonnête, de présenter l'espéranto comme une langue totalement inventée, créée de toutes pièces, surtout en insistant sur l'épithète « artificiel » à des fins dévalorisantes, répulsives. Spécialiste de la science des signes (la sémiotique), auparavant sceptique, le professeur Umberto Eco ne s'y est pas trompé. Après avoir été amené à l'étudier dans le cadre de la préparation d'un cours au Collège de France sur la recherche de la langue parfaite, en 1992, il a lui-même conclu que « c'est une langue construite avec intelligence et qui a une histoire très belle ». Compte tenu du silence qui règne à son encontre et des obstructions qui lui ont été opposées dans certaine sphères, dont l'information, l'enseignement, la politique, pas seulement par les régimes totalitaires, l'espéranto marche à merveille. Résister et se développer dans de telles conditions est la démonstration d'une vivacité bien réelle, d'une belle vigueur. Curieusement, dès qu'il s'agit d'espéranto, certains sentent qu'il est possible de dire n'importe

quoi. J'ai eu l'occasion de faire de semblables remarques à Patricia Martin, sur France Inter. Pourtant admirable, elle avait acquiescé, peut être sous l'influence d'un Calvet (?), à de semblables âneries prononcées par Jean-Jacques Aillagon, alors ministre de la Culture. Ce n'est pourtant pas excessivement compliqué, à l'heure d'Internet, de vérifier le bon fonctionnement de l'espéranto, de voir où sont le vrai et le faux dans tous ces avis et a priori répandus par des personnes qui, comme Calvet, ont des idées fixes et figées sur la question.

Henri Masson
Coauteur, avec René Centassi, ancien rédacteur en chef de L'AFP, de L'homme qui a défié Babel, paru simultanément en seconde édition avec la traduction en espéranto chez L'Harmattan, Paris, 2001. (Traduction en cours en espagnol et en coréen à partir de l'espéranto).

Extrait de : La Sat. Amikara Gazeto (novembre 2004)

« Silence » est une revue pour l'écologie, les alternatives, la non violence. Dans le n° 321 de mars, Henri Masson a plaidé sur 10 pages que la langue peut être aussi un élément de paix.

Ce n° (4^E + frais de port 2^E, ou 3^E pour 2 exemplaires, 4^E pour 3 ex. ou plus) peut être demandé à : Silence, 9 Rue Dumenge 69317 Lyon cedex 04.

Faire payer les anglophones, telle était la conclusion de la brillante conférence de Claude Piron à Boulogne-sur-mer. La GB tire profit des séjours linguistiques (700 M de livres sterling par an), plus que le pétrole de la Mer du Nord, sans parler de la charge financière imposée pour l'étude de l'anglais dans plus de 200 pays. « Le pollueur doit aussi être le payeur »...

Dans la traduction, faite à Bruxelles, de la constitution européenne pour la Lettonie, plus de 500 erreurs ont été relevées, dont plus de 160 « substantielles », d'après le magazine « Focus ». Quelle était la langue de départ ?



Diversaĵoj :

« Le Monde de l'Education »

En la aprila kaj maja numeroj de tiu revuo aperis leteroj de legantoj favoraj al E^o.

Esperanto-Info

La ĝenerala jarkunveno okazos sabaton, la 2an de julio, ekde la 15a horo ĉe la sidejo (Mas St Chély 48)

Hotelo Esperanto

Ĝi troviĝas en Cannes jam de 1930. Ankaŭ ekzistas tie strato Zamenhof (de 1933) kaj bushaltejo Zamenhof (de 1991). 3 Zeoj!

Pri la hotelo vidu www.hotel-esperanto-cannes.cote.azur.fr/

Tinĉjo en Tibeto (vidu ankaŭ p. 3)

Sur la dorsa kovrilpaĝo la teksto jenas :

« La albumo emfazas la toleremon, la amikecon kaj la solidarecon inter la diversnaciaj homoj. Esperanto ĝuste kontribuas al la disvolviĝo de tiaj valoroj tra la mondo ».

La demando pri la lingvoj...

...estas por Eŭropo esence grava. Tiel titoliĝas prospekto de la asocio « libero por la lingvoj ».

www.liberoporlingvoj.cjb.net

12, Rue Blanqui 33150 Cenon (aliĝo : minimume 20 E)

Reta katalogo

De unu jaro ekzistas la reta katalogo de UEA : <http://katalogo.uea.org> Kiel donaceto por la jubileo, ĝi ekhavis elŝuteblan version (en formato HTML kaj eksperimente CHM). <http://katalogo.uea.org?st=elshuto>

Diplomo kaj libro

Nia samideano Alexandre Rousset (departemento 30) ricevis en Lomé (Togolando) la diplomon de doktoro pri juro. *Gratulojn!* Lia tezo (franclingve) sur 270 paĝoj, pri la objektivaj maljustaĵoj de la francaj tribunaloj inter 1980 kaj 2000 laŭ kategorioj kaj la eblaj rimedoj, estas akirebla ĉe la aŭtoro (110, Rue Général De Gaulle 89100 Sens, tel 03 86 83 28 34), prezo 15^E + sendkostoj 3^E, ĉeko je la nomo de Interland.

Gvatemalo


« Ekoturisma vojaĝo », kunlabore kun la indiĝena asocio « Kichin Konojel », estas planita tien. Malkovru tiun malgrandan landon kaj la civilizon de la Majaĵoj. La grupo ne superos 15 personojn. Daŭro : 3 semajnoj en

januaro/februaro 2006. Solidareca agado dum la restado. Antaŭvidebla kosto : 2000^E.

Philippe Chaignon M.F. du Plan 06470 Guillaumes Villefranche/Vilafranca de Conflent

Tie okazis kataluna renkonto je la 7a kaj 8a de majo. La informo alvenis tro malfrue por la lasta bulteno kaj ankaŭ tiu-ĉi bulteno aperas tro malfrue por anonci la renkonton! Eble SFS ricevos raporton pri la semajnfino? Jen kelkaj informoj el la aliĝilo :

Vilafranca de Conflent estas belega fortikigita urbo mezepoka lokita en Pireneoj. En la urbocentro troviĝas mezepoka foirejo kun artistoj kaj komercistoj; la tuta urbo estas ĉirkaŭita de granda muro kaj ĝin impone protektas la kastelo « Fort Liberià », situanta ĉe la montkolo kaj atingebla per longa ŝtuparo. Krom la beleco de la urbo menciendas la beleco de la pirenea pejzaĝo kaj la groto « Canaletes ». La gastejo estas komforta, la manĝo onidire estas bona kaj abunda... *Kun tia priskribo certe ĉiuj ĝuis la amikecan semajnfino...*



Omaĝo al Amiko.

Komence de la jaro malaperis mia amiko Pierre, senbrue. Malbrue ma li ĉiam estis. Tia oni estas, kiam oni kulturas la teron. Profesie li estis ĝardenisto. Li posedis neimageblan kulturon. De sia junaĝo li multe legis kaj tie ĉerpis ĉiujn siajn konojn. Ankaŭ li trejniis mirindan kaj senliman memorkapablon. Li perfekte regis esperanton kaj li dediĉis multe de sia tempo por ĝi, ekzemple en Greziljono. Kiam mi kontaktis lin por gvidi ekskursojn dum la UK de Montpellier, li senhezite konsentis. Estis por li honoro kaj ĝojo montri nian regionon, kiun li intime konis, al eksterlandaj geamikoj kaj li mirigis la partoprenantojn. «Li parolas multe pli bone ol gvidlibro», konfidis al mi iu.

Mi revidis Pierre lastfoje dum la nacia kongreso en La Roque d'Anthéron kaj tiam li plendetis, ke la « maŝino » ekhavas problemojn.

Ĉar ne estis lia kutimo plendi, mi komprenis, ke estis sufiĉe grava problemo, kaj iun matenon mi legis pri lia forpaso. Adiaŭ, Pierre! Vi mankos al ni kaj al esperanto. J.H.



BULONJO-ĈE-MARO : 1905/2005

En 1905 en Bulonjo okazis premiero

EN LA JARO 1905, nordfrancia havenurbo akceptis 688 homojn el 20 diverslingvaj landoj. Malgraŭ la devenaj malsamecoj, ili renkontis sin en sukcesa, mirinda interkompreniĝo kaj en etoso internacie frateca. Ĉiujn ilin ligis freŝnaskita, esperoplena lingvo : la *Lingvo Internacia* de



la t.n. Doktoro Esperanto...


Unu jaron antaŭe, en 1904, okazis la unua internacia Esperanto-kunveno en la nordfrancia urbo Calais, kie precipe francoj kaj angloj kunvenis. Tiu sukcesa eksperimento instigis al la organizo de vera kongreso en 1905 ; tiam la bulonja advokato Alfred MICHAUX promesis aranĝi tion en Bulonjo-ĉe-Mar.

Kaj efektive, de la 5^a ĝis la 12^a de aŭgusto 1905, Bulonjo pompe gastigis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto, kiun ĉeestis D^{ro} L. L. ZAMENHOF. La Kongreso jam enhavis programerojn de niaj hodiaŭaj Universalaj Kongresoj : oficiala inaŭguro, laborkunvenoj, bankedo, balo, koncertoj, spektakloj, teatraĵoj, ekskursoj (i.a. tuttaga ekskurso)...

De tiam stariĝis longa kaj konstanta kutimo, laŭ kiu la tutmondaj esperantistoj regule renkontiĝas por intersanĝoj riĉaj okaze de kongresoj. Krom la jaro 1887, en kiu naskiĝis la lingvo, la esperantistoj certe memoras tiun jaron 1905 kiel unu el la ĉefaj jaroj de la lingvo kaj ties komunumo.

La disvolviĝo de la Kongreso

SABATON vespere la 5^{an} de aŭgusto 1905 okazis la inaŭguro en la urba teatro, kie aŭdiĝis la fama parolado de ZAMENHOF, je kies fino li deklamis *La Preĝon sub la Verda*



Tekstoj el la kongreslibro 2005

Standardo. La kongresanoj ankaŭ ĝuis la teatraĵon *Mensogo pro Amo* de LABICHE.

Dimanĉon abato PELTIER faris diservon ; sekvis naciaj kunvenoj. Post la posttagmeza ekskurso en la banurbo Wimereux, oni ludis *Kontraŭvola Edziĝo* de MOLIÈRE.

Lundon estis laborkunsidoj matene, kaj posttagmeze granda bankedo kaj balo kun naciaj kaj regionaj vestaĵoj en la kazino.

Mardon okazis ĝeneralaj kunsidoj. Tiam oni parolis pri la enkonduko de Esperanto kiel telegrafa lingvo, kaj disputis pri la tikla demando estigi internacian organizaĵon de la esperantistaro (grave intervenis KABE). Vespere, post klarigoj de ZAMENHOF pri prononcado, la 16-jara PRIVAT parolis pri la disvastigo de Esperanto inter junuloj, kaj BOIRAC prelegis pri la maniero enigi la lingvon en la lernejaj programoj.

Merkredon la 9^{an} de aŭgusto estis konsistigita la provizora Lingva Komitato (antaŭulo de la Akademio de Esperanto). Tiam ankaŭ estis alprenitaj la fama *Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo* kaj la *Fundamento de Esperanto*. Krome estis adoptita la verda standardo de la Esperanto-movado.

Fine, post solena fermo de la Kongreso, la kongresanoj ekskursis *ĵaŭdon* kaj *vendredon* inter la « kvar esperantistaj havenoj » : Bulonjo, Folkestone, Dover kaj Calais.

Memorindaj decidoj

Okaze de la unua Universala Kongreso en Bulonjo estis alprenitaj pluraj aktoj kaj decidoj, kiuj rolis en la historio de la lingvo kaj de ties komunumo :

La Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (alinomita *Bulonja Deklaracio*) proklamas, ke : — 1^o La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrala, kiu servu por interkompreniĝo de la diverslingvaj homoj ; — 2^o Lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, perfekte vivipova, kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto ; — 3^o La aŭtoro de la lingvo rezignis pri ĉiuj personaj rajtoj rilate la lingvon kaj transdonis ĝin por la tuta mondo ; — 4^o La sola bazo, deviga por ĉiam kaj por ĉiuj esperantistoj estas la *Fundamento de Esperanto* ; — 5^o Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas



la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas.

La Fundamento de Esperanto difinas i.a. la 16 fundamentajn gramatikajn regulojn de la lingvo. « [Ĝia] severa netuŝebleco [...] gardas ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektigiĝadi. »

La Lingva Komitato fondita dum la Kongreso fariĝis en 1948 la nuna Akademio de Esperanto.

La esperantista standardo de la loka grupo de Bulonjo estis oficiale adoptita de la kongresanaro kiel la standardo de la Esperanto-movado.

Memorindaj diroj



estu ĝiaj sekvoj ! »

« Ni konsciis bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marjo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj

Ludwik Lejzer ZAMENHOF el la inaŭgura parolado, 1905



oficirojn, kuracistojn, scienculojn aŭ komercistojn, alkurintajn el tuta Eŭropo. Ĝis frumateno babilis grupoj de fervoraj sidantoj en ĉirkaŭaj restoracioj. »

Edmond PRIVAT

« La Kongreso okazis meze de ĝenerala entuziasmo, en vere emociiga kaj kortuŝa etoso. [...] La urbo Boulogne plej prave iniciatis eternigi tiun memorindan eventon, donante la nomon «Doktoro Zamenhof» al unu el siaj publikaj placoj, proksime de la hejmo de Alfred Michaux, kie loĝis dum la Kongreso Doktoro kaj Sinjorino Zamenhof. »

Paul BOULET, sekretario de la Organiza Komitato de 1905

Sudstila arkitekturo sub norda ĉielo, amfiteatro de Vilnius nestis inter krutaj montetoj, en kiun penetras boskoj kaj dezertebenaĵoj, globformaj somernuboj kaj aŭtuna nebulo — tio ĉi komponiĝas en miraklan bildon, kiu disradias spiriton de libereco kaj individueco, tiel kutiman por tuta Eŭropo.


Ne estas surprize, ke la ĉefurbo de Litovio iĝis unu el la plej popularaj direktoj en Orienta Eŭropo. Litovia ĉefurbo estas konsiderata kiel alloga kaj vere vizitinda loko.

Se vi estas ŝatanto de arkitekturo aŭ socia vivo, opero aŭ basketbalo, butikumado aŭ stratfestivaloj, Vilnius estas ideala por stopi vojaĝante proksime de Baltaj landoj aŭ Skandinavio.

Se vi ĝis nun ne aŭdis multon pri Vilnius, esperu tion en estonteco. Do, ne hezitu! Aldonu Vilnius en vian liston de plej vizitindaj urboj. Vi povas alveni por mallonga vizito kaj neniam vi facile decidiĝos forveturi de ĉi tie. Kaj tiam jam estos vi, kiu demandos... ĉu vi aŭdis pri Vilnius?

Hodiaŭa malnova urboparto de Vilnius ampleksas multajn historiajn stilojn, kie dominas malfrua baroko. Granda parto de konstruaĵoj aperis post grandaj incendioj de 1610, 1737, 1748 kaj 1749. Tiam sur loko de lignaj konstruaĵoj aperis fundamentaj, ŝtonaj. Post la Dua Mondmilito kaj dum la periodo de soveta

okupacio la urbo preskaŭ ne ŝanĝis sian vizaĝon (dum la jaroj 1944-1990 oni proponis multajn projektojn pri forigo de ĝiaj apartaj kvartaloj, tamen, feliĉe, ili restis nur sur papero). En 1994 malnovan urboparton de Vilnius UNESKO proklamis kiel monumenton de monda kultura heredaĵo. Dank'al tio ekis granda laboro pri necesa renovigo. Nun Vilnius estas titolata kiel unu el la plej aŭtentikaj modernaj malnovaj urboj de Eŭropo. Sur malvastaj kurbaj stratetoj altiras okulon belegaj historiaj konstruaĵoj — loĝejoj, religiaj kaj akademijaj. En nordorienta parto de malnova urbo, sur Katedrala placo, situas katolika katedralo, restaŭrita kaj reakirinta sian eksan ĉarmon. Necesus mencii multajn aliajn konstruaĵojn kaj lokojn. Komprenble, esceptindas universitata komplekso, preĝejo de Sankta Anna, strato Pilies (Kastela, la plej malnova strato de Vilnius), Aŭrora pordego kaj preĝejoj de diversaj religiaj konfesioj. Granda parto de malnova urboparto kaŝiĝas en internaj kortoj, kaj por turistoj oni proponas ĉion ĉi esplori. En tiu ĉi parto de Vilnius ne funkcias urba trafiko. Ĉi tiu loko estas atingebla per persona aŭto aŭ taksio, sed tra la malnova urboparto estas rekomendinde promenadi perpiede, malrapide, kaj tiam ĉiun atendas propraj malkovroj.



Plej granda malnova urboparto en Orienta Eŭropo

En Vilnius funkcias sep profesiaj teatraj trupoj, multaj simfoniaj kaj ĉambraj orkestroj, ĥoroj kaj aliaj profesiaj artaj grupoj. Ajnan tagon eblas aŭskulti plej diversajn verkojn — ekde Johann Sebastian Bach ĝis la muziko de lokaj komponistoj kaj plenumantoj. Senhezite Vilnius estas ankaŭ la urbo de muzeoj. En la Muzeo de Aplika Arto nun prezentiĝas granda ekspozicio *Kristanismo en litova arto*, kiu montras pli ol 250 objektojn el oro kaj arĝento kun juvelŝtonoj (tiu ĉi kolekto dum kelkaj jarcentoj en la katedralo estis kaŝita de publika okulo). Ĉiujare en Vilnius organiziĝas enlandaj kaj internaciaj festivaloj. Ekzemple, septembro estas monato de internacia ĵaza festivalo. Okazas festivaloj de blovorkestroj kaj gaja, amuza karnavalo de Vilnius.

Tamen por la urboj plej ŝatata aranĝo, ŝajne, estas printempa kermeso de Kaziukas, kiu siatempe estis organizata omaĝe al pola reĝo kaj litova grandduko Kazimiro, kiu estas patrono de Litovio kaj proklamita kiel sanktulo. Al la kermeso kun siaj manlaboroj alvenas litovaj teksistoj, forĝistoj, potistoj. Dum tiu ĉi siaspeca tritaga ekskurso tra la mondo de tradiciaj metioj urbanojn kaj gastojn amuzigas stratmuzikistoj. Ĉiu monato distingiĝas per io speciala. En julio Vilnius ankoraŭ ĝojigos siajn gastojn per koncertoj de organa kaj ĉambra muziko, mirinda festivalo de Sankta Kristoforo, festivalo de populara kanto, ankaŭ per koncertoj de tradicia popola muziko kaj religiaj festivaloj. Loĝantoj de Litovio naskiĝis kaj edukiĝis sur la kulturo, ensorbis ĝin en sinojn. En Vilnius neniu enuas, ĉi tie ĉiu povas trovi plaĉan distron kaj amuzon por si.

Grandan amuzon ofertas vagadoj tra nokta Vilnius. Bolanta nokta vivo de la urbo ne estas komparebla kun la situacio antaŭ dek jaroj. Vizitante kafejojn kaj klubojn, vi povas facile imagi, ke vi troviĝas kvazaŭ en Parizo aŭ Londono. En solidaj noktaj kaj muzikaj kluboj eblas danci kaj amuziĝi dum tuta nokto. En restoracioj sonas tradicia litova popola muziko. Por tiuj, kiuj ŝatas sporton, estas antaŭviditaj kegloludoj, teniskortoj, basenoj, sporthaloj, ankaŭ nova golfejo. Kuraĝuloj povas flugi super la urbo per balono. Lastatempe Vilnius famiĝis per regulaj semajnfinaj saltoj (kun elastaj ŝnuroj) de televida turo ekde 270 m alteco. Tiu ĉi salto (bungee jump) estas la plej alta en Eŭropo!

Por la kinoamantoj funkcias kelkaj modernaj larĝekranaj kinejoj, kiuj kontentigos la bezonojn de la plej postulemaj spektantoj. En Vilnius pli kaj pli ofte estas aranĝataj ĉiuspecaj internaciaj filmfestivaloj.




Urbo de kulturo



Plonĝu en la urbon!

Universala Kongreso de la Centjarigo en Vilno
 Eĉ se Litovio estas malgranda lando kaj la UK ne arigos pli ol 2000 homojn, la teca esperantistaro bone preparis ĝin, eldonis broŝurojn, librojn en E* (ekzemple pri la litova lingvo aŭ pri la lando dum jarcentoj), ankaŭ vidbendojn aŭ DVD-ojn (ekz. « Baltmara sukceso »). Rete informoj pri la urbo estas troveblaj en E* ĉe <http://www.turizmas.vilnius.lt>, kiu ne estas asocia sed municipa hejmapaĝo.
 Ĉi-poste parto de la teksto :

KRUCVORTOJ



Solvej de la 134-a

HORIZONTALE

- I) - Higrometr(o).
 II) - Ĉeĉeno.
 III) - Premego / s : Lanugo.
 IV) - Jeremiad(o) / Malordita deviz(o).
 V) - Gramin(o) / Pronomo.
 VI) - Malrespondi / Plenir(i,o,a)ta vojar(o).
 VII) - Malnova mezurunuo / Kiel muzika trupo.
 VIII) - Skirp(o), plibone dirita / Azia moner(o).
 IX) - s : Viktimo... ? / Ne plu rekonata mamul(o).
 X) - Vapormaŝino.


s : sone

VERTIKALE

- 1) - Religia ĉef(o).
 2) - Gustuma moment(o) / Oriento.
 3) - Islama ĉefanĝelo.
 4) - Kapabla / Likvaĵo.
 5) - Vivanta kolekt(o) / Mezurunuo / s : Biblia filo.
 6) - Bruo, litere.
 7) - s : Kaprico / Vivanta intern(o) / Kemia simbolo.
 8) - Mita juĝisto / Loĝi.
 9) - Danĝera mallongigo / Gramin(o).
 10) - Bulteno, iam.

BOPARO

... ni malkovris "la viadukton" ! ...



Eiffel-turon kun ĝia anteno, desegnis la brita arkitekto *Norman Forster*. Ĝi ebligas rapide surveturi 345 kilometrojn da aŭtovoĵego inter *Clermont-Ferrand* kaj *Béziers*, kiam ankoraŭ kelkaj okulfrapaj laborlokoj en la montaro sanigos la tutan itineron.

La firma *Eiffage*, kiu ŝuldas sian nomon al la inĝinero de la "turo" entreprenis la starigon de la ponto. Elspeziĝis tiucele 394 milionoj da eŭroj. La nura metala ŝoseo postulis 36 000 tunojn da ŝtalo ellaboritaj en *Lauterbourg* (Alzaco), tio estas kvinoble pli ol bezonis la pariza turo ! La ŝoseo, 2460 metrojn longa, ripozas sur sep pilieroj, la plej alta kulminas je 240 metroj... ĝis sub la pontoplanko ! Mil homoj laboris tie ek de 2001 ĝis la inaŭguro en ĉeesto de la prezidanto *Chirac* la 14an de decembro 2004...

10 000 veturiloj ĉiutage -26 000 dumsomere !- uzos la viadukton...

Nu, karaj legantoj, valoros iomete devojiĝi por ĝui poste la mediteranean sunon !

El « *La informilo* », kun la afabla permeso de la aŭtoro *Pol Denis*

La venonta SFSj aperos komence de julio ; limdato por la kontribuoj : 19a de junio .
 Redaktoro : *Jean Hénin-Beauregard*- Route de *Montcayroux-48500 La Canourgue*
 Telefono/Telekopio : 04 66 32 86 36 jean.henin@wanadoo.fr . Anticipan dankon !